# Esperanto en Danio

16-a jarkolekto • n-ro 2 • aprilo 2009




## El foiro AKTIVA en Odense: la plej juna deĵoranto en DEA-budo ĝis nun

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Ole Terkelsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 32 50 50 88 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.06.2009**

# Enhavo

Jarraporto de DEA pri la agado dum 2008....................................3
Informado..................................5
Partopreno en aranĝoj ...............6
Eksteraj rilatoj...........................9
DEJO......................................10
Dana Esperanto Instituto..........11
Jarraportoj de la Kluboj...........11
Kalkulaĵoj................................16
Omaĝe al Marie Schrøder............18
Klubaj okazontaĵoj.......................27
Eŭropa civitana konsultiĝo..........27
Sveda jarkunveno.........................27

Frontpaĝe: Morten kaj Julianna Juhl-Johansen Zölde-Fejér kun sia infaneto en ”Foiro AKTIVA”

# Jarraporto de DEA pri la agado dum 2008

La jaro 2008 estis por nia dana movado speciala jaro pro la centjaraj jubileoj de KEK, de DEA kaj de UEA. La danaj jubileoj estis rimarkitaj en elstaraj danaj gazetoj kaj en la Dana Radio P1. Nia klopodo esti pli videblaj pludaŭris kaj rezultiĝis en aliro de kursanoj, precipe en Kopenhago, sed ankaŭ ĉe niaj aliaj kluboj. Tamen la nombro de nia membraro ne plialtiĝis, ĉar eĉ se membriĝis pluraj novaj membroj, pluraj maljunaj membroj forlasis nin. Fine de la jaro nia membronombro estis 227.

La kontakto kun aliaj NRO-organizoj (la UN-Asocio kaj Gepatra-Lingva Asocio) pludaŭris, kaj ambaŭ asocioj estis reprezentitaj dum nia jubileo. Post nia jubilea jarkunveno, precipe septembro estis tre aktiva monato, kun pluraj samtempaj aranĝoj. Nia videbleco eĉ plifortiĝis ĉar DEA membriĝis ankaŭ al NRO-Forumo de la Baltaj landoj kaj partoprenis ties 8a kunveno en Helsingør dum 4 tagoj fine de februaro 2009.

La laboro por eldonado de dana-Esperanta vortaro estas pli ampleksa ol ni imagis, kaj ĝi ne efektiviĝis dum la jubilea jaro kiel ni revis, sed ni havas fortan esperon ke ni povos eldoni ĉi-jare. Pro tiu laboro ni prokrastis la alian revon pri eldono de malgranda historio de la dana movado, sed ni daŭre esperas plenigi ankaŭ tiun taskon.




Jarfine ni translokiĝis al nova ejo en Tomsgårdsvej 35 kie niaj agadoj havas eĉ pli bonajn kondiĉojn ol en la malnova ejo.

Dum la jaro forpasis nia antaŭe tre aktiva membro Kaj Røssum.

Mi dankas la estrarojn kaj ĉiuj niaj membroj kiuj apogas nian agadon.

## Sukcesplena jubilea jarkunveno de DEA

De la 18-a ĝis la 20 de aprilo DEA festis sian centjaran jubileon. La inaŭguro komenciĝis per antaŭtagmeza vizito al la tombejo de la patrino de la dana movado Margrethe Noll, fare de la prezidantino Ileana Schrøder kaj de nia honora gasto Renato Corsetti. Posttagmeze okazis la solena aranĝo kun pli ol 80 partoprenantoj el Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Italio, Litovio, Norvegio, Portugalio kaj Svedio kiu komenciĝis per jubilea tosto kaj oficialaj salutoj, interalie de la repreprezentanto de la dana UN-Asocio kaj de la Gepatra-Lingva Asocio.

Sekvis la festparolado de Renato Corsetti, muzika interludo de Wendy Meng, satira skeĉo ”Estis – Estas – estos” de la dana junulara sekcio, kaj tiu parto finiĝis per kantado de danaj popolkantoj fare de profesia koruso kaj komuna kantado de la himno de Eŭropo kaj de la Espero.



Unu el la pintaj aranĝoj estis la oficiala malfermo de ampleksa ekspozicio kun fragmentoj pri la unua jarcento de la movado, aranĝita de Mogens Rude Andersen. Tie oni povis trovi la unuan lernolibon de Zamehof kaj la unuan danan vortaron, librojn kaj lernolibrojn eldonitajn dum la jaroj en Danio ktp. Post la bankedo oni ĝuis la koncerton de JOMO kiu brile distris kaj kune kun Kim Henriksen instigis la gastojn partopreni al tre viglaj dancoj.

La sekva tago estis kleriga tago kun brilaj prelegoj de Detlev Blanke pri ”Lingvopolitiko”, Wera Blanke pri ”Publike paroli”, Mogens Rude Andersen pri la dramoplenaj tagoj en Montevideo en 1954, Renato Corsetti pri ”La malbona lingvo aŭ la eŭropa dialekto de Esperanto”, Anna Lövenstein pri ”Esperanto kiel familia lingvo” kaj lumbildprelego ”Antaŭ 2000 jaroj” pri la vivo de la antikvaj romanoj. Vespere estis organizita forveturo al la fama ĝardeno kaj amuzejo Tivoli meze de la urbo.

Dimanĉe Eugeniusz Rybarczyk gvidis ekskurson tra la urbo kaj havenan boatekskurson por la eksterlandaj gastoj, dum okazis la ĝeneralaj kunvenoj de DEA kaj de DEJO.

Entute laŭdire rimarkebla solena kaj eventplena programo, neforgeseble pinta jarkunevno!

## Informado




### *Esperanto en Danio*

La revuo aperis 4 fojojn. Ni trovis alian malmultekostan eblecon por presado de nia revuo, kaj pro tio la estraro decidis ke la revuo ekde ĉi-jare aperu 5 fojojn jare. Nia redaktoro kune kun la prezidantinoj de DEA kaj KEK partoprenis la tre sukcesan unuan kongreson de esperanto-ĵurnalistoj kiu okazis en Vilnius en majo.

### *Informa materialo*

La organizo E@I eldonis novan DVD kun la titolo ”Esperanto estas ...”, kiu estas treege taŭga por montri al la cetera mondo kio estas Esperanto kaj nia movado. Oni povas aĉeti la DVD ĉe nia Libroservo.

### *Gazetoj*

Sercante per infomedia.dk la vorton ”Esperanto” dum 2008, oni trovas 90 artikolojn. Ofte temas nur pri metaforo de komuna aŭ nekomprenebla lingvo, sed la 100-jaraj jubileoj de DEA kaj KEK rezultigis kelkajn dece grandajn artikolojn en la gravaj tutlandaj gazetoj Berlingske Tidende, Jyllandsposten kaj Politiken, kaj ankaŭ lokaj gazetoj partoprenis kun interesaj sufiĉe grandaj artikoloj.

Rimarkinde estas ke du eksterlandaj eventoj raportiĝis, nome la fondo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio en Litovio kaj supozata minaco al

la G8-kunveno en Japanio. Krome menciindas KEF, la botela redonejo de DEJO en la Roskilde-festivalo kaj la agadoj de Næstved Esperanto-Unuiĝo.

La nomo Esperanto kutime estas ligita al io pozitiva, ekzemple la restoracio Esperanto en Stokholmo ofte estas menciata apud tiu de Noma, la plej elstara restoracio de Danio. Esperanto nun ankaŭ rimarkiĝas en dana fikcia literaturo. La konata aŭtorino Merete Pryds Helle kontribuis al la antologio ”Koldingkrøniken” per rakonto pri du idealistoj en la urbo Kolding kiuj lernas Esperanton en 1938.

### *Hejmpaĝo*

Ni plibonigis la hejpaĝon aŭtune 2008 kaj ni daŭre konstatas bonan efikon de la servo ĉar ni daŭre ricevas mesaĝojn de personoj kiuj deziras havi kontakton kun DEA. Rimarkinde estas ke la hejmpaĝo de DEA estas videbla en la nova DVD de E@I ”Esperanto estas ...”.

### *Esperanto-nyt*

En 2008 aperis unu numero kiu estas la lasta, ĉar Ejnar Hjort decidis fermi la eldonon de tiu tre taŭga reklamilo. Ni elkore dankas lin pro la multjara iniciato.

### *Prelegoj*

La 17an de septembro 2008 la prezidantino prelegis pri Esperanto en la Rotaria sekcio de Solrød Strand, kaj la 21an de novembro ŝi prelegis pri ”Interkultura dialogo kaj lingvaj rajtoj” en Esperanto-unuiĝo de Næstved. Ambaŭ prelegoj estis en la dana.

## Partopreno en aranĝoj

### *Eŭropa Socia Forumo*

La landaj asocioj de Danio kaj Svedio kune kun Eŭropa Esperanto-Unio sukcese kunlaboris partoprenante kune dum la Eŭropa Socia Forumo, kiu okazis de la 17a ĝis la 21a de septembro 2008 en Malmö. Dum ĉiuj tagoj funkciis budo, kie la deĵorantoj vigle diskutis kun la vizitantoj kaj disdonis centojn da flugfoliojn en diversaj eŭropaj lingvoj, afable senditaj de la

diversaj Esperanto Asocioj de EEU.

La 20an de septembro la prezidanto de EEU Séan O'Riain prelegis pri la temo: ”Egalrajta interkultura dialogo en tutmondiĝanta mondo”, enfazante ke Esperanto estus la plej bona solvo por internaciaj lingvaj problemoj, kiuj ĵus tre evidentiĝis dum la Forumo, kie la organizantoj klopodis solvi pere de volontulaj interpretistoj, sed plej ofte oni tamen uzis la anglan lingvon. Post li, Lars Forsmann enkondukis la partoprenantojn al rekta metodo de lernado. Sekvis vigla diskuto kaj junaj lernantoj de filmlernejo filmis la seminarion.

Posttagmeze okazis granda manifestacio kun partopreno de pli ol 15 000 personoj. Nian movadon reprezentis grupo de danaj kaj svedaj esperantistoj de Sunda Agado. Esperanto fariĝis videbla ankaŭ en la gazeto de la Forumo, kie ĉiuj 3 partoprenantaj asocioj estis menciitaj. Kompreneble estus dezirinde ke multe pli da esperantistoj partoprenu, sed tion bedaŭrinde malpermesas la financaj rimedoj de la partoprenantoj, kiuj devas mem pagi ĉiujn kostojn. Alia vojo estas komprenigi la diversajn organizojn pri la utileco de komunikado pere de Esperanto. Ni tamen sukcesis ke la hejmpaĝo de la Forumo estis parte tradukita en Esperanto.

***Lingva festivalo 2008***



Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj DEA kaj KEK aranĝis lingvofestivalon la 21an de septembro kunlabore kun la Gepatra-Lingva Asocio. Por la unua fojo la festivalo estis finance subvenciata de la Kopenhaga Komunumo pere de la Kulturdomo kaj de la Loka komunuma grupo de Bispebjerg.

Dum sia malferma saluto Ileana Schrøder akcentisinteralie la starpunkton de UEA pri lingvaj rajtoj kaj Esperanton kiel simbolo de paco kaj demokratia kunvivado pere de egalrajta komunikado.



Honoraj gastoj estis la prezidanto de EEU Séan O'Riain kiu emfazis la gravecon de subteno al gepatraj lingvoj pere de siaj propraj spertoj pri la Irlanda lingvo. Sekvis parolado de membro de la dana parlamento Mogens Jensen, kiu elokvente kaj varme subtenis plur-lingvecon dum sia 20 minutojn longa parolado. Ĉeestis la ambasadoro de Indonezio kiu ankaŭ simpatie subtenas esperanton, kaj kiu afable disponigis tre ĉarman dancistinon kiu amuzis nin per eleganta danco de Javo-insulo.

Sekvis prezentado de jenaj lingvoj: Esperanto, araba, indonezia, franca, ĉina, irlanda, latina, japana, novhebrea, gronlanda, hinda, germana, pola, aramea, latva, angla, eŭska, dana kaj svahila, dum en granda salono belaspektaj budoj prezentis la lingvojn pere de libroj kaj aliaj informiloj. La muzika parto konsistis el koncertoj de latva muzikgrupo, Hotel' Desperado kaj fine la tre populara dana grupo ” Middle East Peace Orchestra” (Mezorienta Pacorkestro).

***Eŭropa tago de Lingvoj***

Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj estis organizita ekspozicio de libroj kaj revuoj de la 22a de septembro ĝis la 4a de oktobro kunlabore kun la Biblioteko de Gladsaxe en la halo de la biblioteko. En la hejmpaĝo de la biblioteko oni povis legi pri Esperanto kaj ĝia iniciatinto, pri la centjara jubileo de DEA kaj pri la graveco de lingvoj kiel simbolo de integriĝo kaj paca kunekzisto, sed ankaŭ pri la Tago de Lingvoj kaj pri la Jaro de Lingvoj proklamita de UN.

***Partopreno en foiroj***

Ni ĉeestis en la foiro ”Krop-Sind-Ånd” (Korpo-Menso-Spirito) en Kopen-hago de la 1-a de februaro ĝis la 3-a de februaro, kaj en Aalborg de la

4-a ĝis la 6-a de aprilo, kie ni kiel kutime ekspoziciis librojn kaj gazetojn kaj disdonis flugfoliojn. Krome KEK partoprenis en la tago de integriĝo en Kopenhago.

## Eksteraj rilatoj

DEA estas daŭre membro de la reprezenta komitato de la UN-Asocio, kaj kunlaboras kun la Gepatra-Lingva Asocio, sed ni konstante klopodas larĝigi la rilatojn kun aliaj NRO-organizoj. Fine de 2008 ni aliĝis al la Forumo kies nomo estas ”Baltic Sea NGO network” (mallonge BS NGO, t.e. NRO-reto de Balta Maro). La Forumo estis fondita en 2001 laŭ dana iniciato, kaj ĝia celo estas interŝanĝo de spertoj, plibonigo de scio kaj kreado de partnerecaj rilatoj por subteni transnaciajn ligojn inter NRO-organizoj de la diversaj baltaj landoj, sed ankaŭ igi la NRO-organizojn pli videblaj por influi la procezon de demokratia decidado je nacia, regiona kaj EŭropUnia niveloj. Unu el la interesaj por ni agadoj estas la temo de tutviva lernado kiu povas eble doni al ni eblecojn fari projektojn subvenciotajn de EU. De la 26-a de februaro ĝis la 1-a de marto ĉi-jare DEA kaj EEU estis reprezentitaj ĉe la 8a NRO-Forumo de landoj ĉe Balta Maro, kie partoprenis 120 reprezentantoj de NRO-organizoj de la 8 landoj ĉirkaŭ Balta Maro.



## Instruado

### *ILEI sekcio*

*(Raportas Arne Casper)*

La lernolibro por komencantoj de Stano Marček ”Rekta metodo” en dana versio estis eldonita, kaj sukcese vendita al kursanoj de niaj kluboj. ILEI-membroj de nia sekcio partoprenis en la redaktado de la dana versio. Pluraj

ILEI-membroj partoprenas kiel instruantoj al instruado al kursanoj de Kopenhago, Odense kaj Ålborg.

***Revu- kaj Libroservo***
*(Raportas Arne Casper)*

La eldonado de la nova lernolibro de Stano Marček forte kontribuis al la kontentiga disvendo fare de la Libroservo. Du aliaj pintaj disvendoj okazis dum la jarkunveno de DEA kaj dum la tago de la libro en decembro.

***Ĉefdelegita laboro***

La membronombro de individuaj membroj de UEA estas 97 kaj sufiĉe kontentiga. Ni esperas ke la nombro atingos baldaŭ la magian nombron 100.

## DEJO

*(Raportas Rasmus Høyrup Jensen)*

Ankaŭ somere 2008 DEJO organizis sian grandan eventon: partopreno en la Roskilde-Festivalo zorgante pri prunto-budo kiel volontuloj. Ni sukcese kunvenigis multajn junajn eksterlandajn esperantistojn., kaj denove esperantumis sed ankaŭ reklamis por Esperanto.

Ĉe la jubilea jarkunveno de DEA en aprilo aperis la teatra trupo Fripone kiu tre sukcese kontribuis al la programo kun humura skeĉo trarigardanta la estintecon kaj estontecon de nia movado. Dum la jaro DEJO-anoj organizis renkontiĝojn kaj festkunvenojn. En septembro dekoj da niaj junuloj partoprenis en la parado de Eŭropa Socia Forumo en Malmö, kaj en la lingvo-festivalo en la Kulturdomo.



Niaj membroj Jonas kaj Regin daŭre partoprenas en la instruado. La estraro decidis starigi fakan sekcion kiu estos respondeca pri konkretaj aktivecoj kiel la partopreno al Roskilde-Festivalo, kaj decidis ke oni povos uzi parton de la gajno por helpi junajn membrojn partopreni en pedagogiaj kursoj por instruantoj kaj ekzameniĝi.

Entute DEJO havis sufiĉe bonan jaron kaj mi dankas ĉiujn membrojn kiuj partoprenis en nia agado!

## Dana Esperanto Instituto

*(Raportas Lars Kromann, Bente Christensen kaj Lene Niemann)*

Ja pasinta jaro ne estis bona, rilate al nombro de kursanoj kaj aktiveco entute. Verŝajne pli kaj pli da homoj, kiuj deziras lerni esperanton, uzas la interreton por lerni la lingvon - estas multaj bonaj ofertoj, kaj la 'stilo' de la nuntempo ja estas sidi ĉe la ekrano …

Tiuj, kiuj daŭre uzas nian korespondan kurson, estas ne tute junaj, kaj fakte kelkaj esprimas, ke ili ne antaŭvidas grandan aktivecon en kluboj, en vojaĝoj ktp. – sed estas ja bona afero ankaŭ legi, skribi kaj korespondi, kaj ni laŭ niaj ebloj provas kuraĝigi ilin.

Ni priparolis 'renovigi' la kurson, kiu en si mem estas bonega, sed eble iom 'malnovstila' rilate al temoj, sed neniu el ni havas fortojn aŭ tempon, kaj cetere (kiel jam skribite) la lernantoj estas en la aĝo 50+.

## Jarraportoj de la Kluboj

### *Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago*

*(Raportas Betty Chatterjee)*

Membronombro: dum 2008 ni havis 71 membrojn inkluzive 1 honoran. Dum la jaro forpasis unu membro: Kaj Ĉumbelic Røssum.

Kursoj kaj studgrupoj:La studgrupo gvidata de Bent Wiinberg daŭre legis la libron 'Faktoj kaj Fantazioj'. Tamen de tempo al tempo oni legis aliajn tekstojn de interalie de Florian Bociort kaj Stefan Maul. Arne Casper Mortensen gvidis grupon da lernantoj, kiuj eklernis Esperanton en

februaro. Regin Larsen instruis daŭrigantan grupon de januaro ĝis junio. Aŭtune ekfunkciis grupo de komencantoj (8 personoj), gvidata de Regin Larsen. Babilgrupo lunde je la 18.30-a ĝis la 19.30-a renkontiĝadis en la kafejo de la Kulturdomo.

Prelegoj kaj aliaj aranĝoj: La 6-an de januaro ni festenis la centjaran datrevenon de la klubo per festo kaj koncerto en la Kulturdomo. Partoprenis Mikaelo Bronŝtejn de Rusio, kiu distris nin per kantado kaj gitarludado. Plue la dana koruso Tap distris nin per la kantado de esperantigitaj danaj kantoj.Poste aperis artikoloj pri la evento en Jyllandsposten kaj Politiken, kaj Ileana Schrøder radie parolis pri Esperanto.La klubo bone profitis je la vizito de Mikaelo Bronŝtejn, kiu ankaŭ prelegis en la klubo pri la kuraĝa agado de la SEJM-anoj en Sovetio.

Post tia vigla jarkomenco sekvis 24 sufiĉe diversaj aranĝoj:

- Memorvespero por Claŭde Piron.
- Henning Olsen prelegis okaze de la DEFA sesdekjara jubileo.
- Lars Pilgaard rakontis pri la signifo de Esperanto por blinduloj.
- Okazis du aŭkcioj gvidataj de Eugeniusz Rybarczyk kaj Bent Jensenius.
- Nina Tofte Hansen prelegis pri ekologio kaj la kondicioj de malriĉaj agrikulturistoj en Afrikaj landoj.
- Astrid kaj Erik Mortensen rakontis pri propraj spertoj ĉe Bona Espero.
- Egon Starup Jensen dufoje prelegis pri sciencaj temoj.
- Henning kaj Karen Olsen kartludigis nin kaj gvidis numerludan vesperon.
- La membroj raportis pri siaj spertoj dum someraj kongresoj, kaj ni parolis pri estontaj kongresoj.
- Ni spektis DVD-on pri la Universala Kongreso farita de Sven Sandø.
- Dank'al Aleksandro Kogan ni ankaŭ spektis filmon pri la centjariĝo.
- Jakob Nordfalk prelegis pri siaj vivo kaj agado en Nepalo.
- Bent Jensenius rakontis pri siaj lingvaj travivaĵoj kaj esperantistiĝo.
- La denaska esperantistino Eliza Kehlet rakontis pri sia vivo.
- La geedza paro Fornal el Pollando kontribuis prelegon pri 'Janusz Korczak kaj la Oriento' kaj teatraĵon nomitan 'La Arlekeno'.
- Stanislaw Mielczarek prelegis pri romaoj (ciganoj).

- Okaze de la Zamenhofa tago Birthe Trærup prezentis sian tradukon de la H.C.Andersena Libro: 'En Digters Bazar'.
- Kunlabore kun DEA, la Gepatra-Lingva Asocio kaj la Kopenhaga Komunumo ni okazigis la trian lingvo-festivalon.
- Kiel kutime KEK partoprenis en la Tago de integriĝo en Nørrebro.
- Jytte Sunekær aranĝis pentekostan ekskurson al Høng, kie oni vizitis la esperantistojn Anna kaj Erik Hansen.
- Ni ankaŭ havis la plezuron gastigi esperantistojn el Germanio, Ĉeĥio kaj Slovakio, kiuj rakontis pri siaj landoj kaj agadoj.



Eĉ se ni jam havis ŝanĝojn en la estraro dum la pasinta jaro, t.e. la eksiĝo de la kasisto, la estraro-laboro sufiĉe bone funkciis. Mi precipe dankas al Bent Wiinberg pro lia apogo pri la kalkulaĵoj.

Fine mi volas danki la estraron de DEA, KEK, la klubanojn kaj aliajn bonkorulojn ekstere de la klubo por la apogo kaj la pacienco.

***Esperanto-Unuiĝo de Næstved***
*Raportas Grete Nielsen*

La ĵus pasinta jaro multe similas al la antaŭa, ĉar en la programo estis ordinaraj klubkunvenoj, danlingvaj prelegoj, somera ekskurso kaj kristnaska lunĉo.

Dum la klubkunvenoj – vespere aŭ posttagmeze laŭ la daŭreco de la taglumo – ni uzis la legolibron de Marjorie Boulton Faktoj kaj Fantazioj, la somera ekskurso iris al Køge, kie ni interalie vizitis Astrid kaj Erik, kaj en la kristnaska lunĉo partoprenis ankaŭ DEFA-anoj.

Okazis entute 5 danlingvaj prelegoj: En januaro Sisse Gry Olsen kaj Mads Ringblom Knudsen pri Sirio kaj Jordanio, en februaro Ole Ingstrup pri indianoj en Kanado kaj Birthe Trærup pri la komponisto Bedřich Smetana, en oktobro Lene kaj Jan Niemann pri Laoso kaj en novembro Ileana

Schrøder pri agado kaj celoj de la Esperanto-movado. Tiuj prelegoj estis plurloke menciitaj en la loka gazetaro, eĉ la regiona radio intervjuis Ole Ingstrup okaze de lia prelego. Antaŭ la prelegoj ni kiel kutime manĝis kune dank'al Bente.

La poŝta reklamilo Esperanto – et mellemfolkeligt sprog funkciis dum 2008 alterne en kvar poŝtaj centroj. Pri 2009 ni je verkado de ĉi tiu raporto ne konas la datojn, sed feliĉe pro interveno de la prezidanto de DEA la uzado daŭros.

Ĵus antaŭ novjaro ni elsendis Esperanto-nyt al la kutimaj 80 adresoj (bibliotekoj kaj amasinformiloj). Tiu numero estas la lasta surpapera, la venontaj aperos elektronike. Pro nia multjara kunlaboro kun Ejnar Hjorth kaj Esperanto-nyt ni ricevis la lastan numeron senpage - bona ekonomia helpo por ni.

Nia Novaĵletero aperis 2 fojojn, la estraro kunvenis 1 fojon, nombro de aranĝoj estis 12 (2 nuligitaj), kaj meza nombro de partoprenantoj estis 12,1. En 2008 ni povis bonvenigi du novajn membrojn, tiel ke EUN je la fino de la jaro havas 23 membrojn.

Cetere DEFA nun uzas nian klubejon unu fojon monate dum la vintra sezono. – Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis nian agadon.

***Århus Esperanto-Klubo***
*(Raportas Stanislaw Mielczarek)*

La ĉi-jara raporto estas tre mallonga. La kaŭzo de tio estas, ke niaj aktivecoj en la jaro 2008 estis mizeraj. La klubanaro pli kaj pli maljuniĝas. Kelkaj samideanoj ne plu povas partopreni en kunvenoj kaj al aliaj mankas energio.

Esperanto-klubo de Århus havas nun 37 membrojn. Ni daŭre povas kunveni en tre konvena kaj preskaŭ senpaga kunvenejo en Senior-Centret pagante nur kotizon 50 kronojn jare.

En la 2008-a jaro estis planitaj 9 kunvenoj. Bedaŭrinde kelkaj kunvenoj ne okazis pro la manko de partoprenantoj.

Tamen estas unu hela steleto en niaj aktivecoj. En septembro 8 junuloj komencis lerni Esperanton en la kurso, kiun mi gvidas. La kursanoj fariĝis membroj de nia klubo kaj de Dana Esperanto-Asocio. Nun daŭrigas la kurson 4 partoprenantoj. La kurso finiĝos en majo.

***Nordjutlanda Esperanto-Klubo***
*(Raportas Ejnar Hjorth)*

En la klubo estis, kiel pasintjare, 30 membroj, kelkaj forlasis kaj aliaj novaj alvenis la klubon.

La klubaranĝoj ampleksis precipe Esperanto-kursojn, ni havas tri kursojn en tri niveloj. En 2008 la klubo havis viziton de Mikaelo Bronŝtejn, kiu faris prelegon kaj prezentis siajn librojn, ludis gitaron kaj kantis.

Ni ankaŭ partoprenis la ekspozicion en Aalborg-hallen. Tie ni disdonis multajn slipojn pri ESPERANTO-QUIZ, kaj ricevis kelkajn respondojn. Al ili ni sendis libro-premion kaj la unuan kajeron de la Friis-kurso, kaj invitis ilin al kurso dum la aŭtuno. Tial ni havis 4 komencantojn, 3 el ili estis rezulto de la ekspozicio en Aalborghallen.

Mi disdonis multajn ekzemplerojn de Esperanto-nyt kaj broŝuroj al la Universitato kaj al Studenterhuset, sed tio ankoraŭ ne donis rezulton. – Tamen ni semas kaj semas …



*Kunsido de Sunda Esperanto-Agado*

# DEAs regnskab 2008

| *Indtægter* | *Kr.* | *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Kontingent klubber | 15.485,00 | Administration | 5.698,36 |
| Individuaj | 10.850,00 | Gebyrer | 406,00 |
| DEJO | 1.170,00 | UEA & EEU konting. | 2.093,25 |
| Tilskud husleje | 26.130,00 | 4% til Noll Fonden | 406,00 |
| Gaver | 5.282,00 | Arrangementer | 6.497,56 |
| Renter | 7.660,40 | Årsmøde | 7.339,42 |
| | | EeD | 10.134,87 |
| I alt indtægter | 66.577,40 | Repræsentation | 600,00 |
| | | Husleje | 26.130,00 |
| Årets resultat | 7.049,34 | Libroservo | 222,60 |
| | 59.528,06 | I alt udgifter DEA | 59.528,06 |

| *Aktiver* | *Kr.* | *Passiver* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Virksomh. Oblig. | 85.986,01 | Egenkapital primo | 204.539,60 |
| Libroservo | 35.280,42 | Årets resultat | 7.049,34 |
| UEA konto | 2.447,75 | Egenkapital ultimo | 211.588,94 |
| Bankindestående | 104.423,76 | DEJO kapital | 19.397,00 |
| Debitorer | 3.550,00 | Kreditorer | 702,00 |
| | 231.687,94 | | 231.687,94 |
| | ======== | | ======== |

Bemærkning:
843 stk. Bankinvest Virksomhedsobligationer er bogført med købskurs 102,00.

Ileana Schrøder
Formand

Arne Casper
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den 8.2.2009

Lars Kromann ~~Jensen~~
Revisor

Tara Gregers
Revisor

# Noll regnskab 2008

| *Indtægter* | kr. | *Udgifter* | kr. |
|---|---|---|---|
| 4% af DEAs individuaj | 406,00 | Gravsted | 755,63 |
| Udbytte | 2.840,00 | Gravsten | 4.980,00 |
| | | Gebyr | 5,00 |
| | | | 5.740,63 |
| I alt | 3.246,00 | | |
| Årets underskud | 2.494,63 | | |
| alt | 5.740,63 | I alt | 5.740,63 |

| *Aktiver* | kr. | *Passiver* | kr. |
|---|---|---|---|
| Obligationer | 57.936,00 | Egenkapital 1/1 2009 | 61.616,36 |
| Bank | 1.185,73 | Årets underskud | 2.494,63 |
| I alt | 59.121,73 | I alt | 59.121,73 |

Ileana Schrøder
Formand

Arne Casper
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden

Revisor
8/2-2009

Revisor
Tara Gregers
8/2-2009

# Omaĝe al Marie Schrøder

*(liriko de Kim Henriksen)*

Sur vand' en klubej'
Pendas malnova fot'
Belulin', mistika vizaĝ'
Mi tre ŝatus koni vin.




Marie..estis via nom'
Marie..sed tro juna vi iris for
Marie..falis vi de svisa rok'
Sed vi ĉiam estos en mia memor'

Kaj nun mi anas en via klub'
Mi vidas vian foton
Kaj mi admiras vin
Kia junulina fortec'

Marie..estis via nom'
Marie.. sed tro juna vi iris for
Marie..falis vi de svisa rok'
Sed skribis amikoj sur via tomba ŝton'

'Dankon pro via laboro
por alta kara celo.
Mem vi restos en memoro
De anoj de l'verda stelo'



## *La sortobato*

Nek Kim nek alia nun vivanta persono iam renkontiĝis kun tiu ĉi memorinda virino, tamen ŝajnas ke ĉiuj danaj esperantistoj konas la tristan historion pri ŝia morto pro falo de la monto Frohenalpstock en la svisa montaro la 27-an de aŭgusto 1909. Kiam nur 27-jaraĝa fervora belulino tiel mortas ne estas surprize ke kreivulo ekvolis verki kanton pri ŝi. Tamen eventiĝas ke ŝi, sen troigo, ne estis nur belulino, sed ankaŭ unu el niaj plej gravaj pioniroj. Eĉ se ŝia kolegino Margrethe Noll estis nomita la patrino de la dana Esperanto-movado, pli ĝuste ni diru, ke la dana movado havis du patrinojn dum la unuaj du jaroj.

En Dana Esperantisto numero 9 septembre 1909 Margrethe Noll skribis nekrologon pri ŝi:

> ‘*La vera animo forlasis nin’ tiel skribis antaŭ unu jaro unu el la K.E.K-aninoj, kiam S-ino Marie Schrøder forlasis la estraron de KEK: tiam ni ne pensis, ke post unu jaro la tuta dana esperantistaro povos ripeti la saman frazon aldonante la malgrandan vorton ‘por ĉiam’.*
>
> *Jes, nia kara, ŝatata samideanino estas for; je mardo la 31. de aŭgusto alvenis de Ĝenevo telegramo, kiu mallonge raportis ke: La Esperantistino – Marie Schrøder estas trovita morta.*
>
> *Neniam la esperantistoj en Danujo ricevis pli malĝojan sciigon ol tiu; neniu povas kompreni, ke la juna gaja virino, kiun oni ĵus adiaŭis antaŭ ŝia vojaĝo al Barcelono, ne atingos ĉi-tiun urbon, ne revenos kaj rakontos pri la kongreso, kie ŝi reprezentus Danujon kiel deligito.*
>
> *Granda estas la doloro en la esperantistaro, ĉar grava estas la perdo; certe neniu laboris tiel multe kaj fervore por nia afero dum la lastaj du jaroj, neniu sin oferis tiel volonte kaj donis sian tutan liberan tempon kaj ĉiujn siajn fortojn al la Esperanta laboro.*
>
> *Se ni legos la historion de la movado en Danujo dum la du lastaj jaroj, ni ĉie trovos la nomon de S-ino Schrøder. De la unua momento, kiam ŝi fariĝis Esperantisto ŝi nelaceble aranĝis ĉion; estas ŝi, kiu fondis*

*K.E.K., kiu starigis C.D.E.L., kiu ĉefe aranĝis la postkongresojn tagojn en Kopenhago dum la lasta somero; ŝi plibonigis nian gazeton, elsendis la kolektarojn de gazetoj inter la diversaj kluboj, proponis la unuan danan esp. jarkunvenon kaj ankaŭ zorgis pri ĝia efektiviĝo; ni ĉiuj memoras la grandan laboron, kiun ŝi havis antaŭ ĉi-tiu unua loka kongreso en Danujo, kaj ankaŭ sian grandan sukceson, kiam ŝi preskaŭ sen la antaŭ-preparo parolis, ne sole por si mem, sed ankaŭ por S-ro Skeel-Giørlling, kiu ja bedaŭrinde ne povis ĉeesti. Ne malpli valoraj estis ankaŭ ŝiaj penadoj por kunligi niajn svedajn samideanojn al Dana Esperantisto.*

*Jes, certe ne ekzistas ia entrepreno en la dana Esperanto-movado, pro kiu ni ne ŝuldas dankon al S-ino Schrøder. Ĉiuj multe aŭdis pri ŝia granda energio, kaj ankaŭ multaj konis ĝin, sed certe neniu konis ŝin kaj ŝian laboremecon kiel mi, kiu dum unu kaj duona jaro preskaŭ ĉiutage laboris kune kun ŝi kaj de proksime vidis kiom da tempo kaj kiom da fortoj ŝi uzis por servi al nia afero; ofte ŝi havis tiom da laboro, kaj laboro tute okupis ŝiajn pensojn, ke ŝi forgesis manĝi dum la tuta tago. Estis granda plezuro labori kune kun ŝi, ĉar ŝi ĉiam laboris kun ĝojo kaj intereso, kaj dum ĉi-tiuj laborplenaj vesperoj kaj noktoj, mi konatiĝis kun ŝia varma kaj riĉa koro; ŝi estis sindona kaj fidela kiel amiko, pardonema kontraŭ malamikoj.*

*La dana esperantistaro perdis unu el la siaj plej valoraj apogoj, al kiu ni ŝuldas multe da dankoj, kaj kiam ni diros al vi, nia kara neforgesbla samideanino, la lastan adaiaŭon, ni aldonu ankaŭ nian plej sinceran dankon pro via granda laboro; la memoro pri vi ĉiam restos inter viaj dankemaj samideanoj kaj amikoj.*

Margrethe Noll ne estis la sola, kiu tiel laŭdis ŝin. Dum la solena malfermo de la 5-a Universala Kongreso en Barcelono en kiu partoprenis 1300 personoj, Ludoviko Zamenhof zorgoplene parolis pri ŝia forpaso. Li petis al la ĉeestantaro, ke oni leviĝu por honori ŝian memoron kaj proponis sendi kondolencan telegramon al ŝia familio. Poste kiam la dana esperantistaro komencis monkolekton por la starigo de tombŝtono, li donacis la plej grandan sumon de 10 rubloj, t.e. 19 kronoj. Entute oni ricevis 190,52 kronojn de la esperantistaro kaj de Danio kaj de aliaj landoj.

En aŭgusto 1910 okazis Socialdemokrata Kongreso en Kopenhago. Pluraj el ties partoprenoj estis esperantistoj, tial dimanĉon la 28-an de aŭgusto 1910 kolektiĝis granda kaj internacia grupo esperantista en la tombejo Assistens apud la tombo de Marie Schrøder. Tiun ĉi tagon okaze de la unua jardatreveno de ŝia morto oni renkontiĝis kun la familianoj por solene starigi tombŝtonon. La belan monumenton portas reliefan portretan medaljonon en bronzo. Tiu ĉi skulptaĵo estis farita de iu S-ro Lindow, kies edzino estis fervora esperantistino.

***Diligentulino***



Kiu ŝi estis, kia ŝi estis kaj kio okazis dum la nur 20 monatoj en kiuj ŝi oferis sin al la Esperanta afero?

Wihelmina Marie Schrøder naskiĝis la 18-an de marto 1882. La gepatroj nomiĝis Peter Christian Harreskou Schrøder kaj Karen Marie Pedersdatter, ilia tombo situas apud la tombo de Marie. Ŝi estis havis parencon en la ĵurnalisto Harald Schrøder, kiun la gazeto Politiken sendis eksterlanden en 1907, por ke li konstatu, ĉu Esperanto estis tiel grava, kiel la adeptoj jam kredas. Marie Schrøder estis unu el la 412 personoj, kiuj aliĝis al la kurso aranĝita de Politiken en aŭtuno 1907.

Dekomence ŝi estis agema virino. Marie Schrøder eniris la estraron de KEK la 2-an de januaro 1908. La estraron de Centra Dana Esperantista Ligo ŝi ankaŭ eniris kiam ĝi estis fondita printempe 1907. Tie ŝi aktiviĝis en la administra kaj vojaĝa elektitaroj. Tial ŝi estis unu el la personoj, kiuj havis la respondecon por aranĝi kaj la vojaĝon al la 4-a Universala Kongreso en Dresdeno kaj la treege ambicia postkongreso en Kopenhago.

Marie Schrøder estis unu el la preskaŭ 20 KEK-anoj, kiuj partoprenis la Dresdenan Kongreson, kaj dank' al ŝi restas ege entuziasme pasia priskribo pri tiu ĉi evento, kiu kompreneble estis por ŝi la unua universala kongreso kaj verŝajne ŝia unua eksterlanda vojaĝo. Kortuŝe estas memori ke tiu ĉi vojaĝo estis ŝia lasta. Komence ŝi skribis:

> *Se oni volas konservi la tradician regulon, ke ĉiu nova Esperanto-kongreso devas superi la antaŭan, bedaŭrinda estas la komitato por la*

*Kvina. Rigardita de ordinara homa vidpunkto ĝia tasko ŝajnas esti neplenumebla!*

*Kiamaniere superi la solenan malferman feston, la ĝojegan respektan minutlongan saluton per kiu la ĉeestantaro certigis al nia kara Majstro sian dankemecon kaj fidelecon al li kaj lia granda vivlaboro, - kiamaniere superi la grandiozajn festojn kaj ekskursojn, la neforgeseblan, brilegan, prezentadon de 'Ifigenio en Taŭrido' kaj antaŭ ĉio la harmonian, korĝojigan kunrestadon de unu kaj duona milo da trideknaciaj samlingvanoj!*

*Malfeliĉa, enviinda kvina komitato, kiu troviĝos inda je tiu honora metio!*

Do daŭre ŝi rakontis pri la granda publika kunveno en *Vereinshaus,* kie parolis multaj eminentuloj pri la estonteco de Esperanto. Post tio, longe post noktomezo oni paroladis kaj kantis la plej amatajn Esperantajn kantojn. La venontan matenon oni frue leviĝis por ĉeesti la solenan malfermon en kiu partoprenis la Majstro. Dum la tuta semajno ŝi spertis nekredeble agrablajn okazojn kaj renkontiĝojn, kelkajn el ili ŝi tute ne povis priskribi pro ties grandegeco: ekskursoj, teatraĵoj, grandiozaj kolektoj, koncertoj kaj ĉiam la amaso de samideanoj el tridek landoj.

Finfine ŝi skribis:

*La harmonia, sukcesplena Kvara estis finita, - - vivu la kvina en Barcelona kaj la Sesa en Chautauka!*

Laŭ la informo de Margrethe Noll en sia rakonto en la libro 'Konversacia Esperantista Klubo', eldonota 50 jarojn pli poste:

*(26.08.1908) Entuziasme oni antaŭe havis la frenezan ideon inviti al postkongresaj tagoj en Kopenhago. Zamenhof timis la longan marvojaĝon kaj rifuzis, sed dank' al la persvado de f-ino Schrøder, li tamen cedis, kaj tuj enskribis sin lia tiama kortego el la plej eminentaj esperantistoj, kiu ĉiam sekvis lin. 80 personoj entute el 16 nacioj, de Siberio ĝis Brazilio. Granda akcepto kun verdaj standardoj en la ĉefstacio kaj eĉ Esperanto-parolantaj policanoj kun verdaj steloj.*

*(27.08.1908) La grandioza programo inkludis ekskurson al Helsingør per ŝipo, lunĉo kaj vizito en Kronborg, Marienlyst kaj Helsingborg. Vespere oni festis ĉe KEK.*



*Unu ne tro klara foto el la Postkongreso.*
*Meze ges-roj Zamenhof, maldekstre Marie Schrøder.*

*(28.08.1908) Vizitoj en la muzeo de Thorvaldsen, la bierfarejo de Carlsberg, la besta ĝardeno, la paviliono de Langelinie, la virineto de la maro, la Gliptoteko (akcepto de bierfaristo d-ro Jacobsen kaj oficiala akcepto de urbestro Jensen, kiu faris sian paroladon en Esperanto (laŭ manuskripto). Vespera aranĝo en Tivoli, kaj adiaŭa glaso ĉe Wivel. La komponisto de la Esperanto-himno barono de Ménil verkis jenan adiaŭan saluton:*

*Adiaŭ, afablaj kaj karaj amikoj,*
*Adiaŭ, vi spritaj kaj ĉarmaj daninoj.*
*En niaj la koroj pri via akcepto*
*Konservas vi ĉiam tre dolĉan memoron!'*

Aŭtune 1908 ŝi eksiĝis el la estraro kune kun pluraj el la aliaj inkluzive la prezidanton. Ĉu regis la problemoj en la klubo? Mi kredas ke ne, ĉar okaze de tiu ĉi evento oni agrable festis la 15-an de oktobro. Dum la festo la kasisto s-ro Barnuel dankis la eksmembrojn de la estraro, 'turnante sin kun afablaj vortoj al ĉiu el ili aparte, sed precipe s-inon Schrøder, kiu fondis la klubon li kore dankis kaj laŭdis kiel la patrinon de l' klubo, la veran animon. Iu (F.K.?) verkis honoran kaj laŭdan poemon pri ŝi:

La vera animo forlasis nin,
Sen animo estas la klubo;

Kaj kiu nun anstataŭos ŝin
En la nova estrara grupo?

Neniu laboris pli multe ol ŝi
Por ĉiuj niaj aferoj;
Eĉ parton da noktoj oferis ŝi,
Se ne sufiĉis vesperoj.

El tua koro ni dankas vin,
Laboreman, ŝatatan, animon
Sinceran dankemon ja sentas ni
Por vi kaj plej grandan estimon.

Eble la kialo por ŝia eksiĝo de la estraro temas pri la troega laboremeco, ĉar ŝi respondecis pri multe da aliaj aferoj, inkluzive tiun de CDEL. Tial verŝajne ŝi klopodis iom bremsi sin. La 13-an de februaro 1909 okaze de la ĝeneralkunveno 'ŝi retiris sin laŭ propra deziro'. Tamen du el ŝiaj proponoj estis akceptitaj:

1. Elsendo de kolektaro de esperantaj gazetoj por senpaga cirkulado inter la diversaj kluboj.
2. Starigo de dana esperantista jarkunveno.

Eĉ se ŝi ne restis kiel aktivulo en estraro, ŝi daŭre estis administranto en Store Kongensgade 39.

### *Plua aktiveco*

La unua dana esperantista jarkunveno okazis en Aarhus dimanĉe la 11-an de julio 1909. La 70 partoprenantoj el Aalborg, Aarhus, Kopenhago, Odense, Randers, Rønne, Skive kaj Vejle renkontiĝis en Alléenberg Restoracio. Skeel-Giørling la prezidanto ne povis ĉeesti, tial Margrethe Schrøder anstataŭis lin. En sia prelego, ŝi rakontis pri la historio kaj la evoluo de la helpolingvo kaj ties signifo por la komerco kaj la turismado. Plue ŝi parolis pri la fondiĝo de la Universala Esperanto-Asocio. Finfine ŝi idealisme apelaciis al la gepatraro kaj la lernantaro, ke ili apogu la Esperantan aferon pro la faktaj kaj la idealismaj valoroj, kiuj estas enhavotaj en la kontaktoj inter la junularo en la tuta mondo.

Kiel kunredaktoro kun Margrethe Noll de la Dana Esperantisto ŝi monate legis proksimume 60 esperantajn gazetojn de aliaj landoj, kaj poste ŝi

skribis pri ili aŭ citis el ilia enhavo. (informo pri tio troviĝas en Kontaktilo aprilo 1947). Ekzemple en la aprila numero de la Dana Esperantisto aperis novaĵoj de Hispanio, Usono, Finnlando, Pollando, Svislando, Bohemio kaj Japanio. Ŝi mem trovis la tempon por verki artikolojn: ekzemple:

- Pri kvarnacia pentekosta ekskurso
- La kongresaj tagoj en Dresdeno
- La postkongresaj tagoj en Berlino kaj Kopenhago
- La Esperantista Gazetaro

Ŝi eĉ trovis la tempon por traduki esperanten. En la Dana Esperantisto oni legas, ke:

> *La 23-an de aprilo 1907 oni aŭdis S-inon Schrøder laŭtlegi memtradukon de 'Kristnaska Nokto' de C. Ewald kaj la rakonton 'Guteto de lakto'. Ŝi kaj tradukis la danan nacian kanton:*
>
> *'Reĝ' Kristjan staris ĉe la mast'*<br>
> *en pulva fum'*<br>
> *la glavon uzis li kun fort'*<br>
> *por malamik' terura sort'*<br>
> *ktp.*

Tiun ĉi kanton oni kantis dum la unua dana esperantista jarkunveno en Aarhus en 1909.

### *Politiko kaj polemiko*

Ŝajnas, ke ŝi interesiĝis pri la balotrajto de virinoj. En 1908 danaj virinoj povis unuafoje baloti en la elektoj de la "civitana reprezentantaro" (magistrato) de Kopenhago. La 11-an de marto 1908

> *Sinjorino Marie Schrøder parolis pri 'la virinoj kaj la elekto de burĝa reprezentaro', absolute aktuala temo, ĉar je la sekvanta tago la kopenhagaj civitaninoj unuafoje partoprenos en tia elekto. Akcentante precipe, ke kune kun la voĉdonrajto la virinoj ricevis ankaŭ voĉdon-devon, la parolinto gvidis la aŭskultantojn tra ĉiuj okazantaĵoj de elekta tago, kaj post la instruktiva parolado ĉiuj K.E.K.-aninoj konis siajn tiu-rilatajn devojn.*

Dum la nur 20 monatoj de ŝia fervora esperanta agado, eksplodis la Ido-konflikto. Ekde februaro 1909 okazadis pli-malpli akra debato kun titolo

‘Paco’ en la revuo Dana Esperantisto. Unue Marie Schrøder mem ne rekte implikis ŝin –(kiel kunredaktorino, ŝi nur skribis):

> *De nia antaŭa, ŝatata kunlaboranto, Sro Poul Borberg, ni ricevis la sekvantan artikolon, kies publikigon ni ne volas malhelpi, kvankam la enhavo en diversaj rilatoj ne reprezentas la opinion de Centra Dana Esperantista Ligo.*

Tamen finfine en junio kaj julio 1909 ŝi mem kontribuis artikolojn, en kiu ŝi klopodis pacigi la kontraŭulojn. Komence ŝi plendis, ke la malferma diskuto en la gazeto tute ne helpis la malkomprenojn inter la disputantoj, ĉar tiel batalante oni ne aŭskultis unu la alian kaj oni forgesis la ekster-esperantistan publikon, kiu nek povas nek volas rigardi la aferon de sama vidpunkto. Pro tio, ŝajnis al ŝi ke la publiko jam komencas fariĝi iomete suspektema pri la lingva afero. La 22 jaraĝa lingvo jam videblas kaj agnoskis de famaj scienculoj kiel bona rimedo por internacia komunikado. La lingvaj demandoj kaj la gramatikeroj devus esti afero por

> *nia komitato kaj ĝia akademio. Ĉar por la eksteruloj, la varbotoj, ekzistas neniuj lingvaj demandoj; por ili la helplingva movado estas, kaj devas esti, pure praktika demando......mi bone scias, ke niaj vicoj konstante plinombriĝas – mi mem laŭpove kunhelpas – sed la novaj varbitoj ĉefe estas idealistoj kiel ni mem. Certe ankaŭ neniu praktikulo vere kredas, ke ni povos varbi la realistojn dum la nuna necerta situacio.*

Fine ŝi proponis, ke oni daŭre diskutu la lingvajn demandojn dum la Barcelona kongreso, tie kie ŝi estis elektota kiel delegito por Danio. Tamen bedaŭrinde ŝi neniam atingis la kongreson – jen grandega perdo por la familio kaj la egale grandega perdo por la dana Esperanto-movado.

Jes, ankaŭ mi volus koni ŝin!

*Betty Chatterjee*

# Klubaj okazontaĵoj

**Kopenhago, Kulturdomo NV**

20.04.2009 Studgrupo.
27.04.2009 Prelego pri Vikopedio (Rut Jesus).
04.05.2009 Ŝerca vespero.
11.05.2009 Studgrupo
18.05.2009 Kantvespero
25.05.2009 Ekskursa vespero.
01.06.2009 Pentekosto – neniu kunveno.
08.06.2009 Aŭkcio.
15.06.2009 Studgrupo
22.06.2009 Somera festo

**Næstved, Grønnegade 10B**

Sabate 13.06 je h 09.00: Somera ekskurso al vindindaĵoj en Fakse kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Informiĝu ĉe la sekretario.

# Eŭropa civitana konsultiĝo

Eble ne sen inspiro de la usona Change.org (pri kiu ni raportis pasint-numere), la belga "Fonduso de Reĝo Baŭdoin" kune kun longa vico da eŭropaj civitanaj organizoj lanĉis la "Eŭropajn Civitanajn Konsultiĝojn 2009" en ĉiuj landoj de EU. De decembro ĝis aprilo okazis debato kaj kolektado de proponoj, kaj en la plimulto de landoj perrete kolektitaj proponoj rilate al Esperanto atingis la unuan lokon, tiel ankaŭ en Danio. En Bruselo 10-11 de majo okazos "Eŭrop-Civitana Pintkunveno", kie la partoprenontoj finvortigos rekomendaron kaj diskutos ĝin kun politikaj decidistoj. Pluaj regionaj konferencoj okazos dum aŭtuno 2009.
Pliaj informoj ĉe www.europaeiske-borgerkonsultationer.eu kaj (anglalingve) www.european-citizens-consultations.eu.

# Sveda jarkunveno

... okazos 22a-24a de majo en Fornby, Dalekarlio, 230 km nordokcidente de Stokholmo. (Eks)kursoj, infanejo, teatraĵo, prelego de Paŭl Gubbins, rabato por eksterlandanoj. Informoj kaj aliĝoj ĉe SEF, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm, rete www.esperanto.se/esperantistoj/sef/ aŭ per retletero al sefkongr09@esperanto.se.




*Liss-Lotte, Arne kaj Signe en la AKTIVA-foiro en Odense*




*Ĉe la fama "Korpo-Menso-Spirito" en Aalborg:*
*deĵoras Ina Busck kaj Arne Pedersen*